N. N. 13,

Trinka kanto

tradukita de Ludwig Emil Meier

1. Fratoj, al festeno bona Dio
Kunvenigis nin en kanta ĥor',
Ĉiun zorgon tuj per energio
Ni kuntrinkantuloj ĉasu for!
Kie ŝaŭmas vin',
Ĝoj' florigas nin
Kiel de l'printempo bela flor'.

2. Gaje ni traĝoju la junecon
Kun amikoj bonaj en kunven',
Ili donu al ni kontentecon,
Kaj la vino estu kora ben'!
Per vinbera fort'
Kontraŭ iu sort'
Ni jen armigitaj de deven'!

3. Ne trinketu nur el la pokalo,
Kiam plena estas la barel',
Kiu ĝuas vivon tute en tervalo,
Ne konscias pri vivada cel'!
Vigle trinku do!
Malplenigu, ho!
Plua pleno kuŝas jen en kel'!

4. Kun lumama sento la junulo
Bonkuraĝe venas tra vivad',
Kaj kun amikeco la kunulo
Li turnadas laŭ destina rad'.[2]
Vi do fidu min:
Ĝis de l'mondo fin'
Estos mi fidela kamarad'!

5. Ne sen uz' pasigu la junecon.
El pokalo laŭ konata fam',
Vi elĉerpos veran la belecon:
Ĉe knabina brusto kora am'!
Kiam lasos nin
La junec' kaj vin',
Nin akceptu, Ĥaron, via pram'!

. . .

[2]pli bone eble:
Sin turnadas laŭ destina rad'.
(La verbo “turni” ja estas transitiva kaj bezonas objekton.)

Traduko de la Germana poemo "Trinklied" de N. N. 13 en Esperanton de Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919) en 1907.*

Arg-399-790 (2007-03-29 09:44:07)

La esperantigon de tiu ĉi kanto mi, Manfred Retzlaff, trovis en la kant-libreto "Esperantista kantaro", kolekto unua: Germanaj kantoj popolaj kaj studentaj, Esperantigitaj de L. E. Meier, verkisto. La kantlibro estas eldonita en 1907 de la eldonejo Hans Theodor Hoffman, Berlin W 35, Steglitzer Straße 44.